

## & La vidvohomo meditas:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 500 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:23> (/La LaTi doLa dore mimi; Ti Tido reTi redo LaLa;

(#Rekantaĵe: La LaLa SoTi dore mi; Ti Tido miTi re Tido La; So doTi La a))×20 )+

### (&Strofoj:

#### ,&1:

'1 /Multfoje, se la vidvo ardas, ; En fremda lito li petardas

(×; **Vivo forkuras al forges'** ; **Homojn salutu vi per kares'** ; **antaŭ forges'.**)?

'2 Kaj plantas en dezerto rozon, ; Forgesas fotografan pozon .....

'3 Kaj kiel dando volas sceni, ; Ĉevale ami, beste heni, .....

'4 Saturas tiam lin kompren': ; Naskiĝis li por.. am-ge-hen'! .....

#### ,&2:

'5 Multfoje, se la vidvo dignas, ; Senmone ĝojon li rezignas, .....

'6 Palpfosas sube, flagas ruĝe, ; En robon velas sin rifuĝe, .....

'7 Agrafas, ruktas, gratas, krias ; Kaj kiel luno rotacias, .....

'8 Saturas tiam lin kompren': ; Li kuŝas febra sur kusen'! .....

#### ,&3:

'9 Multfoje, se la vidvo larmas, ; Per sobraj pentoj bilde svarmas, .....

'10 Por taksi teran amabsorbon ; Rigardas sian nudan korpon .....

'11 Kaj trotas, tremas, tranĉas, trikas ; Kaj flikŝuite sin reflektas, .....

'12 Saturas tiam lin kompren': ; Ĝi estas la ĉiea pen'! .....

#### ,&4:

'13 Multfoje, se la vidvo bojas, ; Perfide pri bankroto ĝojas, .....

'14 En grunto kotas, mute stultas, ; Senĝoje hontas, katapultas, .....

'15 Akcias ĉekojn, reĝojn mordas, ; Sin banas, trempas, frotas, tordas, .....

'16 Saturas tiam lin kompren': ; Ne pafas lia karaben'! .....

#### ,&5:

'17 La vidvo tiam krie krizas, ; Valorajn bubojnrunde ĉizas, .....

'18 Kaj la dungita prototipo ; Fariĝas pupo, aŭ nur.. pipo! .....

'19 Li tiam volus maŝojn ligi ; Kaj la poetojn tuj pendigi, .....

'20 Ĉar ili vere mokas lin ; Kun sia brua rimmaŝin'! .....